

**LA FILO DE LA HOMO VENIS POR SERĈI KAJ SAVI LA PERDITAĴOJN –
Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM**

El la evangelio laŭ Luko 19, 1-10

En tiu tempo Jesuo eniris en Jeriĥon, por pasi tra tiu urbo. Tie vivis viro, nomata Zakĥeo. Li estis ĉefimpostisto, tre riĉa. Li klopodis vidi Jesuon, sed li ne povis pro la homamaso, ĉar li estis malalta je staturu. Tiam li kuris iom antaŭen kaj grimpis sur arbon, en loko, kie Jesuo devos pasi. Tiel li esperis, ke li sukcesos vidi Lin.

Alveninte tien, Jesuo levis la okulojn kaj diris al Zakĥeo: «Rapidu malsupreniri, ĉar hodiaŭ Mi devas loĝi en via domo». Zakĥeo tuj malsupreniris de la arbo, kaj kun granda ĝojo akceptis Lin en sia hejmo. La ĉeestantoj, vidante tion, murmuradis kontraŭ Jesuo. Ili diris: «Li iris loĝi ĉe uzuristo».

Sed Zakĥeo, starante antaŭ la Sinjoro, diris al Li: «Sinjoro, duonon de miaj posedaĵoj mi donacas al la malriĉuloj; kaj se mi ŝtelis al iu, mi redonos al li kvaroblon». Tiam Jesuo diris al Zakĥeo: «Hodiaŭ venis la savo en ĉi tiun domon. Ankaŭ vi estas filo de Abraham. Nu, la Filo de la homo venis ĝuste por serĉi kaj savi tiujn, kiuj estis perditaj».

Iom antaŭ la ĉi-dimanĉa evangelio, Luko rakontas la epizodon de la riĉa homo, li tiun difinas eminentulo, ĉefo, kiu alproksimiĝis al Jesuo por demandi de li kion li devus fari por eniri la eternan vivon. Jesuo respondis memorigante al li la ordonojn kiuj rilatis la konduton rilate al la proksimulo, kaj, konsiderante ke tiu ĉion plenumis ekde sia junaĝo – pro kio la eterna vivo jam estis al li certigata – Jesuo lin invitis prizorgi tiun ĉi mondon kaj tiun ĉi vivon, lin sekvante, vendante ĉion kion li havis por tion disdoni al la malriĉuloj.

Tiu homo estis perfekta respektanto de la leĝo, kio cetere respondis al la fakto ke li estis eminentulo, ĉefo, sed li ne akceptas la inviton de Jesuo. Lia intereso celis la eternan vivon, la transmondon, dum Jesuo volis lin inviti kunlabori por transformi tiun ĉi vivon, kontribuante al la feliĉo de ĉiuj personoj.

Sed la eminentulo, kiel cetere ĉiuj riĉuloj, deziras ke nenio ŝanĝiĝu, por gardi sian privilegion kaj prestiĝan pozicion. En tiu okazo Jesuo diris ke la riĉeco estas obstaklo praktike nesuperebla por eniri en la Dian Regnon; la fama frazo de Jesuo: *"Estas pli facile fakte por kamelo trairi kudriltruon, ol por riĉulo eniri en la Dian regnon"*.

Nu, en ĉi-dimanĉa evangelio, male, Zakĥeo, ankaŭ li estas riĉa. Estante impostisto li certe ne povis sin glori dirante ke li respektis ĉiujn ordonojn ekde sia junaĝo. Kiel li mem rekonas, li estis ŝtelisto kiu eltordis monon de la personoj.

Zakĥeo ne estas interesata al la eterna vivo kaj Jesuo ne petas de li vendi ĉion kion li havas por tion donaci al la malriĉuloj kaj lin sekvi. Estas li, estas Zakĥeo kiu decidas tion.

Li akceptas Jesuon en sian hejmon, en sian vivon, kaj ĉio ŝanĝiĝas.

Estante riĉa, li iĝas malriĉa; li diras: *"Sinjoro, duonon de miaj posedaĵoj mi donacas al la malriĉuloj; kaj se mi ŝtelis al iu, mi redonos al li kvaroblon."* do li kiu estis riĉa retrovis sin ne plu esti tia, sed finfine li estas feliĉa.

Skribas la evangeliisto ke li ĉion tion faras ĝojoplena. La impostisto rompjis kun la maljusteco kiu skandis lian vivon. Kaj Jesuo proklamas: *"Hodiaŭ"* ne temas do pri promeso por la estonto, *"venis la savo en ĉi tiun domon."*

La aserto de Jesuo gravas ĉar ni emas ĉiam projekcii la savon pri kiu Jesuo parolas en la transmondon. La savo jam ĉeestas, savo kiu rilatas al tiu ĉi vivo, ne al transmondo, savo kiu tamen je la okuloj de la riĉuloj estas pere.

La eminentulo, je la vortoj de Jesuo, skribas la evangeliisto iĝis *tre malgaja ĉar li estis tre riĉa*. La riĉa eminentulo interesiĝis pri la transmondo, li projekciis sian savon en estontan mondon; Zakĥeo, kiu rompjis kun la maljusteco, spertis la savon en tiu ĉi mondo, en sia surtera vivo. La savo por

Jesuo ne estas gardi por si lokon en la transmondo, ankaŭ la eminentulo ĝin jam havis certigita per la respekto de la ordonoj, sed liberiĝi je ĉio kio malhelpas en tiu ĉi vivo esti komplete libera por kunlabori kun Kristo al la realigo de la Dia Regno.